Unua el multnombraj artistoj kiuj estos ĉe la venonta *Hip-hopa Kompilo* ! En la komenciĝo de la Pafklik', la anoj iufoje ne povis repi pro biero kaj malseriozeco sed ili poste decidis ĉion detru, «precipe tiun feklingvon : Esperanto», aldonas Katakana malfermanta sian bieron. Pardonu ilin, ili estas el strato... PafKlik estas vivanta pruvo ke Rep bone sonas en Esperanto !

Kostja

[Rusio]

Li regalis kaj ridigis ĉiujn spektantojn de sia spektaklo dum IJK 2004 en Kovrov, per sia mirinda pantomima kaj humura talento. Ĝuu la nemaltrafandan spektaklon de Kostja unuafoje en Francio, en la prestiĝa kastela kadro!



Sen lifto

Tiu teatraĵo konsistas el diversaj skeĉoj, kies dialogoj estas originalaj, surprizaj kaj ĉiam amuzaj.

La tekstoj, originale verkitaj en la franca, estos prezentataj por la unua fojo en esperanto.

Aliĝu al Festo : <http://esperanto-jeunes.org/festo/>



Park-promenado en Raŝt post la Zamenhof-taga festo, decembro 2004

Nuntempa Irana Esperanta Movado

Esperanto-movado havas longan historion en Irano. En septembro 1916, unufoje kelkaj esperantistoj kunsidis en Teherano kaj fondis Persian Esperanto-Asocion (1). Do ĉi-jare oni festas 90-jariĝon de irana movado. Tie ĉi mi ne celas prezenti historion de Esperanto-movado en Irano, sed priskribi pri la nuna stato de tiu movado laŭbezone menciante kelkajn historiajn notojn.

Organizaĵoj

Irana Esperanto-Asocio, Irana Esperantista Junulara Organizo, Sabzandiŝan-Instituto kaj Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj estas la iranaj esperantaj organizaĵoj kiuj estas prezentataj.

Irana Esperanto-Asocio

Irana Esperanto-Asocio (IREA) fondiĝis en 1996 kaj akceptiĝis kiel landa asocio de UEA lastjare dum la UK en Vilno. Oni miras kial movado kun tiom longa historio ne posedis aliĝintan asocion ĝis nun, se oni ne scias la historion de nia movado.

Sendube la nuna movado en Irano ŝuldas sian prosperon al la klopodoj de D-ro Saheb-Zamani. Li komencis siajn Esperanto-aktivadojn antaŭ la islama revolucio en 1979. Li estis fama psikologo kaj krom siaj Esperanto-agadoj, li estis politike kaj socie aktiva persono. Post la revolucio, li daŭrigis siajn Esperanto-aktivadojn sed pro sia antaŭa personeco, li ne povis libere aktivi.

Estis persekutoj kontraŭ li kaj Esperanto, precipe far instruistoj de la angla, kondamnante E-on al rilato kun cionismo pro la juda deveno de Zamenhof. D-ro Saheb-Zamani elspezis grandan forton por batali kaj sukcesis jure venki la kondamnintojn. Sed la etoso, kion ili faris bezonis longan tempon por ŝanĝiĝi.

Precipe pro tio, li kredis ke irana Esperanto-movado ne bezonas asocion aŭ revuon por prosperi. Eble li timis aŭ ne povis paŝi ĉi-direkten pro la etoso

ĉirkaŭ si. Aliflanke movado de D-ro Saheb-Zamani fakte ne estis demokratia kaj li deziris ne perdi sian estrecon. Pro tio longtempe irana movado malgraŭ siaj meritoj ne posedis asocion aŭ revuon. D-ro Saheb-Zamani kredis ke ekzistas sufiĉe da Esperantogazetoj en la mondo kaj instigis nin verki por ili. Tial aperis historia numero de Kontakto kies enhavon preskaŭ tute verkis irananoj.

Ekde 1992 aperis grupo de junaj esperantistoj, kiuj deziris labori pli libere. La ĉefmotoro de tiu grupo estis S-ro Reza Torabi. Ili sukcesis fondi IREJO-n kaj aliĝi ĝin al TEJO. La grupo ŝvelis kaj ensorbis kelkajn aktivulojn de la grupo de D-ro Saheb-Zamani, kaj fondis Sabzandiŝan-Instituton, la revuon 'Irana Esperantisto', kaj IREA-on dum la venintaj jaroj.

Bedaŭrinde IREA ne havas multe da membroj ; ĉirkaŭ 50 dum la pasinta jaro. Obstakloj al grandigo de la asocio multas sed ni povas mencii du : mankon de landa kongreso por kolekti esperantistojn kaj instigi ilin pagi kotizon kaj oficiale membriĝi ; kaj eblecon aĉeti la revuon 'Irana Esperantisto' de la strataj kioskoj aŭ aboni ĝin sen aliĝi al IREA.

Irana Esperantista Junulara Organizo

Irana Esperantista Junulara Organizo (IREJO) estas la pli malnova junulara sekcio de IREA. Ĝi fondiĝis en 1993 kaj akceptiĝis kiel landa sekcio de TEJO en 1994 dum la IJK en Koreio. Ĝi iam estis aktiva organizaĵo kaj eĉ posedis samtempe tri komitatajn notojn en TEJO-komitato.

Sed dum la lastaj jaroj kaj post la transiro de siaj aktivuloj al mezaĝeco, ĝi bedaŭrinde perdis sian aktivecon. Oni klopodas reaktivigi ĝin sed ni devas ankoraŭ atendi por tiu evento.

Sabzandiŝan-Instituto

Tiu instanco estas oficiale registrita privata instituto por propagandi kaj instrui la lingvon Esperanto. Sabzandiŝan signifas Verdpensuloj en la persa. Fakte ĝi estis la bazo por fondi IREA-on kaj la portalo por havi rilatojn kun iranaj organizaĵoj, ĉar registri IREA-on kiel oficialan asocion bezonas penigan laboron kaj daŭran tempon sed registriĝo de privata lingvo-institucio estas multe pli facila tasko.

Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj

La landa sekcio de ILEI ankaŭ ne estas aktiva nuntempe. Felice la membroj de Irana Ligo de Esperantistaj Instruistoj (IRLEI) decidis reaktivigi ĝin.

Oficejo

Ekzistas oficejo ekde 1997 en Teherano. La lokoj estis luprenitaj inkluzive de la nova ; pro tio la lokoj ŝanĝiĝis 4-foje dum la pasintaj jaroj. Instalita kampanjon por aĉeti lokon estas diskutata.

Revuo

La organo de IREA estas 'Irana Esperantisto'. Relative belaspekta kaj bonkvalita pli-ol-3-jara revuo aperas por montri al neesperantistoj ke nia lingvo ne nur apartenas al la pli-famaj landoj ; Esperanto estas vere

taŭga komunikilo por ĉiuj mondanoj. Irana Esperantisto estas nemalhaveblaĵo por ĉiu esperanta asocio, instituto, klubo, ekspozicio, biblioteko, kaj tiel plu, kiu celas varbi Esperanton kiel vere universalan lingvon.

Sezona 56-paĝa revuo estas ĝuste duone en la persa kaj duone en Esperanto. La persa kaj oficiala nomo de la revuo estas 'Pajam-e Sabzandiŝan' (Mesaĝo de verdpensuloj). En la esperanta parto vi povas trovi artikolojn pri iranaj kulturo, literaturo, kino, turismo kaj Esperanto-movado. Sed troveblas ankaŭ artikoloj de alilandaj kontribuantoj. Ni bone lernis de la sorto de «El Popola Ĉinio» kaj klopodas ne limigi nian revuon al artikoloj nur pri nia lando. La persa parto ĉefe enhavas artikolojn pri Esperanto kaj ties movado kaj celas allogi la legantojn al nia lingvo.

La rajton eldoni Iranan Esperantiston oni gajnis post 5-jara laboro por konvinki iranajn respondeculojn. «Irana Esperantisto» eldoniĝas per la financaj helpoj de iranaj esperantistoj en- aŭ ekster-lande loĝantaj. Malgraŭ la akceptebla kvalito de Irana Esperantisto, la nombro de la abonantoj estas malpli ol atendate. Ni rekomendas al ĉiu Esperanto-instanco kiu celas varbi nian lingvon, aboni ĝin kaj krom subteni ĝin finance, utiligi ĝin varbocele. Vidi iranajn esperantan revuon povas esti pli granda surprizo ol vidi tian revuon ekzemple el okcidenta eŭropo. Aliflanke ni bonvenigas artikolojn de alilandaj esperantistoj. Irana Esperantisto ne nur apartenas al iranaj esperantistoj kaj ne celas nur prezenti Iranon.

Libroj

Dum la lastaj monatoj eldoniĝis du gravaj lernolibroj : La nova eldono de «La Dua Lingvo» de D-

ro Saheb-Zamani, libro pere de kiu multaj irananoj konatiĝis kun Esperanto kaj lernis ĝin ; kaj «La Plej Facila Lingvo de la Mondo» de Inĝ. Ahmad Reza Mamduhi, la prezidanto de IREA. Ambaŭ libroj estas vere bezonataj por Esperanto-instruado al perslingvanoj kaj plenigis longtempe malplenan lokon de novaj lernolibroj. Baldaŭ aperos alia libro de Inĝ. Ahmad Reza Mamduhi kiu baziĝis sur la persa traduko de «La Fenomeno de Esperanto» de William Auld kaj celas prezenti la lingvon al la irana publiko.

Kunsidoj

Ni klopodas organizi iranajn Esperanto-kongreson sed ankoraŭ ne sukcesis precipe pro financaj problemoj. Zamenhof-tagon ni festas kutime. En 2004 okazis tri kunsidoj en tri iranaj urboj : Raŝt, Maŝhad kaj Ŝiraz. Tio en Raŝt (Foto 1) okazis en granda salono apartenanta al banko kaj la du aliaj en universitataj atmosferoj. Pasintjare la festo okazis en la ateliero de S-ro Habibpur, esperantistopentristo (Foto 2). La KD de la programo aĉeteblas ĉe la oficejo.

En la oficejo de IREA ĉiumonate okazas esperanta prelego. La temoj estas variaj kaj elektas ilin la preleganto mem. Se vi planas vojaĝi al Teherano kaj vi deziras partopreni aŭ prelegi, bonvolu kontakti min. Ni ankaŭ kunsidas ĉiu-lunde vespere en la oficejo kaj laŭbezzone (precipe pro alilandaj gastoj) dum la aliaj tagoj de la semajno.

Malgraŭ pli-malpli stabila stato de irana Esperanto-movado (asocio, revuo, oficejo, kunsidoj,...), mi kredas ke ĝi estas en sia nadiro de aktivado. Pasinte la homa forto estis pli granda, kvankam la bazo aŭ ne-homaj fortoj estis malpli. Ni multe diskutis pri

Interreto

Se vi deziras ricevi plian informon pri Esperanto-movado en Irano, vi povas viziti : www.sabzandishan.com (oficiala adreso de Sabzandiŝan-Instituto) www.esperanto.blogfa.com (persa blagejo por aktualaj informoj ; esperanta versio konstruatas.) iranaj-esperantistoj@yahoo.com (grupo pri irana Esperanto-movado)

tiu afero dum niaj kunsidoj sed ne trovis la kialon :

- Ĉu la financa stato de irananoj estas la kialo ? Ne. Nun nia ŝtato vendas nafton kelkoble pli multekoste ol pasinte kaj la financa stato de irananoj estas multe pli bone.

- Ĉu la minaco de milito estas la problemo ? Kiam Teherano estis bombardata de irakaj aviadiloj kaj misiloj, okazis Esperanto-kursoj en la ĉefurbo. Nun kiam estas nur minaco de milito, ne estas logike ke ĝi estu la kaŭzo de malpli-aktiveco de la movado.

- Ĉu irana ŝtato malhelpas Esperanto-movadon ? Ĝis nun oni ne vidis specialan malhelpon aŭ kontraŭstaron flanke de la ŝtato kontraŭ Esperanto.

Ŝajnas ke la nuna stato estas simpla nadiro en la aktivado de irana movado. Ni esperas fruan pason de tiu periodo kaj plivigliĝo de nia movado.

D-ro Keyhan Sayadpour, komitatano de IREA

ksayadpour@yahoo.com



Festo por naskiĝtago de Zamenhof en Teherano, decembro 2005

Referaĵo :
 1- Alireza Dolatŝahi. Historio de Esperanto en Irano (1). Irana Esperantisto. Unua numero; aŭtuno 2002: paĝoj 5-6.

Kiel kontakti IREA-oficejon:
 Strata adreso: Numero 33, Alizade strateto, Ĥagani Strato, Engelab Avenuo, Teherano
 Poŝta adreso: P.O.Kesto 184, Teherano 17765, Irano
 Telefakso: +98-21-88824104
 E-poŝto: info@sabzandishan.com

Jen la arabaj literoj. Ili ĉi tie estas skribitaj en sola situo, fakte kelkaj literoj havas malsaman aspekton kiam ili estas kunligite skribitaj.

| prononco | literonomo | araba litero |
|---|------------|--------------|
| a | alif* | ا |
| b | ba | ب |
| t | ta | ت |
| angla th | tha | ث |
| ĝ | ĝim | ج |
| enspira h | ha | ح |
| ĥ | ĥa | خ |
| d | dal* | د |
| dh | dhal* | ذ |
| r | ra* | ر |
| z | zajn* | ز |
| s | sin | س |
| ŝ | ŝin | ش |
| emfaza s | sod | ص |
| emfaza d | dod | ض |
| emfaza t | to | ط |
| emfaza z | zo | ظ |
| guturala streĉo transskribata en ‘ | ‘ajn | ع |
| kartava r | ghajn | غ |
| f | fa | ف |
| k | kaf | ق |
| k | kaf | ك |
| l | lam | ل |
| m | mim | م |
| n | nun | ن |
| angla h | ha | ه |
| ŭ aŭ u | ŭaŭ* | و |
| j aŭ i | ja | ي |
| voĉa halto sola litero aŭ super alif, ja aŭ ŭaŭ | hamza | ء |

La araba, internacia lingvo

Komuna diraĵo estas tiu, kiu asertas, ke la angla estas internacia lingvo. Pro la apero de koloniaj imperioj, la landoj el Britio aŭ Francio vidis siajn naciajn lingvojn parolataj en multaj landoj en Afriko, Azio aŭ Ameriko. Aliaj lingvoj kiel la hispana, la portugala aŭ la rusa estas ankaŭ tre utilaj por la vojaĝanto ĉar tiuj ĉi lingvoj estas konataj en diversaj landoj. Ĉi-tie menciitaj lingvoj ja estas eŭrop-devenaj. Tamen ekzistas internacia lingvo (komprenu lingvo parolata en diversaj landoj) kiu ne estas eŭropa : la araba. Ĝi eĉ estas la sola neeŭropa lingvo, kiu estas parolata en tiom da landoj.

La araba, fakte semida lingvo, estas uzata de 230 milionoj da homoj de Maroko ĝis Irako. Ĝi ja malsimilas laŭ la diversaj landoj parole, tamen skribe ĝi estas komuna. La gazetoj publikitaj en iu lando estas legataj en la aliaj kaj la arabaj kantistoj estas famaj ne nur en unu lando sed en la tuta araba mondo. Sur la montrotabloj de stratvendistoj, videblas kasedoj de libanaj, siriaj, egiptaj aŭ jemenaj kantistoj. Tamen la araba mondo havas du kulturajn ĉefurbojn : Kairo kaj Bejruto. Tie la plejparto de la libroj en la araba lingvo estas publikigataj, Egiptio kaj Libano alŝutas siajn televidajn elsendojn. Tio klariĝas per historio : en tiuj ĉi landoj okazis dum la 19a jarcento la *nahda* (la renovigo) kiu estis impeta momento en la arabaj provincoj de la otomana imperio. Dum la *nahda* la lingvo renoviĝis, la unuaj gazetoj en la araba aperis kaj sciencoj kaj beleteroj kreskis. En la 20a jarcento, radio kaj kino aperis unue en Kairo. Egiptio havas grandan kinarton, laŭdire la egipta kino estas en la tria vico laŭ la jara nombro de filmoj.

La araba estas parolata ne nur en la dudek du landoj, kiuj konsistigas la Ligon de arabaj

ŝtatoj sed ankaŭ en aliaj landoj. Ekzemple ĝi estas oficiala lingvo en Israelo kaj Eritreo. Tiu lingvo grave influas lingvojn de regionoj ekse regataj de araba imperio aŭ kien la arabaj komercistoj iris. Multe da lingvoj enhavas arabajn radikojn en Eŭropo, en Afriko aŭ en Azio. Eĉ esperanto havas kelkajn arabajn radikojn, ekzemple en la vortoj «admiralo», «cifero», «hazarda», «kafo», «magazeno», «matraco», «sukero», kaj tiel plu. Dum la Mezepoko, kiam la araba imperio estis tre potenca, la araba estis la internacia lingvo kiel la araba mono (la dinaro) estis la internacia mono, eĉ la reĝo de Francio elfaris falsajn dinarojn ! La araba estis tiuokaze la lingvo de la kulturo uzata de scienculoj de Andaluzio ĝis Hindio.

Jen amuza pruvo, ke araba estas internacia lingvo : dum vojaĝo en Balkanio, mi renkontis dufoje arabalingvanojn. La unuan fojon mi miris pri la malnovaj stratoj de la turka kvartalo en Sarajevo, kiam mi ekvidis rufan barbulon kiu vendis diskojn de preĝoj kaj islamaj kantoj antaŭ la moskeo. Li parolis la araban. La duan fojon mi vizitis Skopjon, ĉefurbo de Makedonio. Mi estis en la albana kvartalo dum junuloj proponis al mi grimpi ĝis la supro de la unua horloĝturo en la tuta eksa otomana imperio. Por babilo mi provis la francan, la anglan, kelkajn germanajn vortojn. Sen sukceso, sed unu el la junuloj parolis la araban. Li lernis en Pakistanio, kvankam la nacia lingvo ne estas tie la araba sed la urdua.

Al multe da homoj, la araba unue aperas kiel sankta lingvo. En la islama religio ĝi estas la lingvo de la paradizo kaj de la Korano. Antaŭe la Korano estis studata nur en la araba kaj neniam tradukita. La araba estas ankaŭ la lingvo de la islama preĝo, fakte la du junaj arablingvanoj renkontitaj en Balkanio studis por direkti preĝon. Do la

* Tiuj ĉi literoj estas la ses literoj kiuj ne kunligas la sekvan kiam oni skribas



araba ankaŭ influas kulturon de la islamaj landoj. En ĉiu moskeo de Afriko ĝis Rusio, Ĉinio kaj Indonezio, iu legas kaj parolas la araban. Per preĝo, ĉiuj islamanoj havas rilaton kun la araba lingvo de la Islamo. Plue en Eŭropo kaj Ameriko, multaj arabaj enmigrintoj daŭre parolas sian lingvon. La araba estas parolata preskaŭ ĉie en la mondo. La araba kulturo disvastiĝis per religio, konkerajoj kaj komerco. Eĉ iuj kiuj ne komprenas tiun ĉi lingvon ne povas esti sensenta je tiu ĉi kulturo devenanta el la dezertoj de la araba duoninsulo.

Parŝo

Legu ankaŭ la artikolon en Lingva Prismo : www.lingvo.info/lf/araba.php

La malta lingvo, semida lingvo en Eŭropa Unio

Se la malta lingvo havas substratojn de la fenica kaj de la berbera kaj superstratojn de la itala kaj la sicila, ĝi devenas ĉefe el la araba.

Ĝi pruntoprenis ankaŭ kelkajn vortojn de la franca kaj de la angla. Ĝi estas la sola semida lingvo uzanta la latinan alfabeton.

La gramatiko de la malta lingvo estas proksime de la araba, kaj la plejparto de ĝiaj radikoj estas arabaj (nur la

novaj vortoj uzas italajn, francajn aŭ anglajn radikojn).

Malto nun havas du oficialajn lingvojn: la angla kaj la malta. Tamen okazis en Malto lingva diskuto ĝis la dua mondmilito sed ne inter tiuj ĉi lingvoj. Fakte la elito uzis la italan sed la Angloj, kiuj regis la insulon, timis ke Italio finfine depostulos ĝin.

Post la milito, pro la sufereco kaŭze de la italaj bombadoj, la lingva debato finiĝis.

La svahila lingvo, internacia lingvo de komunikado

La svahila lingvo estas parolata en orienta afriko ĉefe en Kenjo, Tanzanio kaj Ugando. Ĝi estas parolata ankaŭ en kelkaj regionoj de najbaraj landoj ekzemple en Kongo, Zambio, Mozambiko, Ruando, Burundo, Somalio. La lingvo, kiu estas oficiala nur en Tanzanio kaj Kenjo (kun la angla), estas skribata per la latina alfabeto (antaŭ la 19a jarcento per la araba alfabeto).

La svahila lingvo estiĝis kiam la bantuaj popoloj renkontiĝis kun arabaj komercistoj ĉe

la marbordo. La vorttrezoro de tiu-ĉi lingvo estas devena de pluraj lingvoj kies parolantoj regis la regionon aŭ komercis tie. Do la plej multaj vortoj venas de la araba kaj de la angla. Tamen la gramatiko kaj la ofte uzataj vortoj devenas de la bantuaj lingvoj. Kiel ĉiuj bantuaj lingvoj, la svahila uzas prefiksojn antaŭ la radikoj, kiuj ŝanĝas la signifon de la vorto.

La svahila ĉiam estis komunikada lingvo. Per ĝi homoj de diversaj tribaj lingvoj povas

komuniki. Ĉar la unuaj lernolibroj estis publikigitaj en la svahilingva versio de la insulo Zanzibaro, ĝi iĝis la norma dialekto. Fakte la svahila nun estas ĉefe la zanzibara svahila lingvo.

La plej fama vorto el la svahila estas « safari » kiu signifas « vojaĝo » sed se vi vidis la filmon « La Leona reĝo » de Walt Disney vi eble konas aliajn svahilajn vortojn kiel « simba » (leono) aŭ « hakuna matata » (ne estas problemoj) !

Et pour apprendre le swahili : <http://mwanasimba.online.fr/>

Un congrès à Amman

La première rencontre internationale d'espéranto dans un pays arabe



Dôme de la mosquée du roi Abdallah à Amman en Jordanie

Pour celui qui passe son temps libre à feuilleter des revues en espéranto ou à répertorier les sites les plus divers et variés sur la langue de Zamenhof, il s'avère que le monde arabe est l'une des régions du monde qui s'est le moins ouverte à la langue internationale...

Toutefois en 2000 a eu lieu un congrès pionnier dans cette région. Du 22 au 25 juillet 2000, quelques espérantistes se sont réunis à Amman, capitale de la Jordanie. Cet événement eut lieu juste avant l'*Universala Kongreso* de Tel Aviv en Israël et était, je pense, un symbole en direction des espérantistes arabophones. Étant donné la difficulté pour ces derniers d'obtenir des visas pour Israël (voir même l'impossibilité pure et simple), l'avant-congrès d'Amman leur permit d'entrer en contact avec des espérantistes étrangers et stimuler les énergies autour d'un séminaire sur « l'espéranto dans les pays arabes ».

Cette rencontre, certes modeste, ne fut toutefois pas dépourvue de surprises.

Par exemple, les participants eurent la surprise de recevoir la visite d'un jeune bahreïni, étudiant à l'université d'Irbid dans le nord de la Jordanie. Il avait lu quatre ans auparavant un livre sur les cent personnages les plus marquants dans l'histoire parmi lesquels figurait Louis Lazare Zamenhof !

Fasciné par la vie de l'initiateur de l'espéranto, il avait cherché plus d'informations sur Internet et avait appris seul la langue internationale.

Cette visite à Amman constituait pour lui son premier contact avec un espéranto parlé. Aussi les espérantistes étrangers présents lui offrirent quelques livres et brochures.

Il ne put malheureusement rester les jours suivants pour cause d'examen mais également car la suite du séminaire, portant sur le thème de la paix, avait lieu en Israël. Or, en l'état actuel des choses, les bahreïnis ne peuvent se rendre en Israël.

Une autre surprise consista en la présence d'une étudiante jordanienne qui avait entendu parler de l'espéranto dans un article diffusé peu avant le séminaire. Comme elle maîtrisait bien l'anglais et l'espagnol, certains participants purent traduire pour elle.

Le projet de langue internationale la séduisit tellement qu'elle passa le jour suivant à s'affairer pour obtenir un visa en vue de rester un peu plus longtemps en « Espérantie », cette fois-ci de l'autre côté de la frontière.

Elle raconta les jours suivants les multiples problèmes auxquels elle dut faire face à l'ambassade...

Si les participants originaires des pays arabes ne purent se rendre en Israël, notons également qu'aucun Israélien ne participa à cette première rencontre en pays arabe. Si l'espéranto vise à rapprocher les peuples, il faut être conscient qu'il ne pourra le faire tant que les États continueront à hérissier murs et frontières entre les peuples.

En dehors de ces surprises et malheurs, cette rencontre fut une véritable réussite. Les participants purent ainsi assister à des conférences de Renato Corsetti, de Humphrey Tonkin, de Raymond Lecat, et même de l'ancien ministre jordanien de la culture ! Hugh Martin fit une comparaison entre la langue arabe et l'espéranto et Kamal Chaouachi prononça une excellente conférence sur le narguilé, objet social et culturel s'il en est dans la région !

On sait quelle peut être la capacité de mobilisation de telles rencontres auprès des groupes locaux, aussi l'émulation conduisit certains à proposer la création d'une association jordanienne d'espéranto.

Mais l'important n'était pas là ; c'était, pour reprendre les mots de Renato Corsetti, que ce congrès fut avant tout une « rencontre avec des débutants et confirmés locaux. »

Nos informations proviennent principalement du rapport d'Ursula Niesert réalisé pour la liste yahoo **araba-mondo** :
<http://fr.groups.yahoo.com/group/araba-mondo>

Parŝo



Nikolao kuiras...

Tajino kun citrono

Maroka recepto

Por 4 homoj :

1kg da viando senostigita kaj sen-
grasigita : ŝafaŝultraĵo aŭ kokidaĵo
1 konfitita citrono
la suko el unu citrono
1 granda cepo
1 ajlobulbero
½ glaso da olivoleo
10 sekigitaj prunoj
100 g da senĉeligitaj migdaloj
1 eta bukedo da freŝa koriandro
salo



Tranĉu la viandon al pecoj je 4 cm larĝaj

Varmigu la erojn kun la premita ajlo, la fintranĉita cepo, la oleo kaj salo

Kovru ĉion per akvo kaj lasu boleti dum 1 horo

Vi povas aldoni akvon. Miksu de tempo al tempo

Aldonu la citronon, la sekigitajn prunojn, la citronsukon

Boligetu denove dum 15 minutoj, ĝis la saŭco iĝas milda

Dissemu la koriandron.

Citronoj konfitegas kiam ili estas stele tranĉitaj kaj premitaj kaj enfermitaj en bokalo, kiu estas plenigita per salita akvo.

Se mi ne havas platon por tajino, vi povas uzi stufpoton aŭ kovritan porforan pladon.

La manĝaĵo devas malrapide kuirigi.

Vi povas aldoni diversajn specojn laŭ via gusto : « raz el hanout », safranon...

Aliaj receptoj aldonas zingibron

BONAN APETITON!

Pri la citronoj :

Se vi lasas trempi citronon en varmega akvo aŭ se vi rulpremas ĝin, vi obtenas pli da suko.

Fruktoj aŭ legomoj ne nigriĝas se ili estas kovritaj per citronsuko.

Por fari la konfinitajn citronojn, lasu ilin inter 1 kaj 3 monatoj en la bokalo kun sala akvo.

Vidu aliajn receptojn de Nikolao en <http://farbskatol.net/dotclear/index.php?Kuirarto>

Esperanto, eĉ en Afganio

Aidés par des espérantistes iraniens et japonais (et notamment la *Japana Amika Asocio de esperanto-Magio*, JAAedM), de jeunes Afghans ont fondé la *Afgana Amika Asocio de esperanto-Movado* (AAedM) à Kaboul en 2004. Son nouveau président, Esmat ullah Wijdani était auparavant président de la *Afghanistan*

Students Scientific and Culture Foundation, organisation qui soutient la nouvelle association espérantiste. Le mouvement espéranto en Afghanistan se limite pour l'instant à l'Université de Kaboul mais les intéressés ont exprimé le souhait de propager l'espéranto dans les autres universités du pays. Ils cherchent également à accueillir d'autres étudiants dans leur association et souhaitent tout particulièrement la bienvenue aux étudiantes qui décident de les rejoindre.

L'objectif concret de la AAedM est de participer à l'*Universala Kongreso* de Yokohama en 2007. L'association avait également pour projet d'organiser

une *Afgana Esperanto-Renkontiĝo de Internacia Amikeco*. En plus de l'aide apportée par les associations iraniennes et japonaises, UEA a envoyé à la *Kabula Amika Asocio de Esperanto-Movado* des manuels d'espéranto et a fournit une aide pour que des professeurs originaires d'Iran et du Tadjikistan puissent donner des cours d'espéranto à des étudiants de l'Université de Kaboul. Cette initiative a eu un immense succès puisque plus de 150 étudiants sont venus suivre ces cours ainsi que le révèle l'interview de l'enseignant tadjik qui se chargea des cours.

Parŝo



Interview de l'enseignant :

<http://www.liberafolio.org/2005/Agado/kabulokurso>

Site de l'association afghane :

<http://www2u.biglobe.ne.jp/~fukuto/aaadem/aaadem-1.htm>

Grains de thé

La Guinée est un pays d'Afrique de l'Ouest. Elle a une population de 7 millions d'habitants, dont 75% sont des jeunes, répartie en quatre régions naturelles.

Dans la région où je suis, Kankan, les jeunes constituent la couche la plus pauvre avec 62% qui vivent au dessous du seuil de pauvreté. Il y existe un phénomène appelé les «grains de thé».

Les grains de thé à Kankan c'est un regroupement de jeunes autour d'un thé où chacun vient exposer ses problèmes liés, à la misère et aussi à la pauvreté.

C'est le lieu où le jeune arrive à satisfaire sa curiosité pour les affaires de sexe, d'immigration et autres. 80% de ces jeunes sont analphabètes, ils n'ont pas l'esprit à s'organiser. Ceux qui s'organisent n'ont pas la formation de base pour obtenir des financements, aussi la politique du gouvernement fait que ces jeunes ont tendance à l'immigration. Dans ces «grains», on parle de foot, de sexe, de hip hop. À

travers ces réunions, on rencontre des copains, de l'entraide et autres.

Non, je ne parle pas espéranto. C'est lors du forum de Bamako que j'ai connu l'espéranto. Je me suis inscrit à l'espéranto mais je n'ai pas encore reçu de documents. J'ai parlé aux jeunes qui sont très curieux d'y apprendre

Tiu rakonto estas el Gvineo. Gvineo estas lando en okcidenta afriko kie loĝas ĉirkaŭ 7 milionoj da homoj. Tiu lando estas dividita en kvar naturaj regionoj. Unu el tiu regiono estas Kankan kie loĝas Zakaria Kaba. La gejunuloj konsistas la plej malriĉa parto de tiu loĝantaro. 62% vivas sub la mizerlimo. La « grains de thé » (tegrajnoj) estas grupo de gejunuloj en Kankan. Ĉi-vespere, inter 15 kaj 20 gejunuloj renkontiĝas trinkante teon kaj kunparolas pri problemoj seksaj, elmigraj sed ankaŭ ili malkovras novajn aferojn. 80% el tiuj gejunuloj estas nelegoscias. Ili ne havas la spiriton por organizi kaj se ili havas, ili ne havas bazformadon por

cette langue inconnue en Guinée. À Bamako j'ai rencontré un espérantiste. Mon association et d'autres associations sont très désireuses d'apprendre dans les grains de thé où 15 à 20 personnes sont réunies chaque soir, bien organisés avec un président de grains.

Zakaria Kaba

akiri financojn. Pro tio kaj pro la politiko de tiu lando, multaj gejunuloj estas elmigremaj. En tiuj grandoj, futbalo, sekso, « hip-hop » estas kutimaj. Per tiuj kunvenoj, ili renkontiĝas geamikojn, interhelpado kaj aliaj aferoj.

Zakaria Kaba ne parolas esperanton en la forumo de Bamako. Ĝi ankaŭ renkontiĝis esperantiston en tiu urbo. Ĝi rigardis interrete kaj provis aliĝi al JEFO. Sed pro malfacilaĵo sendi monon, ĝi ne sukcesis pagi la kotizon. Ĝi parolis pri esperanto al la gejunuloj de « grains de thé » kiuj estas tre scivolemaj lerni tiun nekonatan kaj strangan lingvon.

esperantigis Julia

Brazilaj spiritistoj subtenas Esperanton

Malfacilas serioze klarigi la ekziston de Esperanto Movado en Brazilo sen autaŭe paroli pri Spiritismo, konsiderante, ke en la nuna minuto 90 procentoj de la brazila esperantistaro spiritismas.

Kio estas Spiritismo ?

Malfacilas diri ene de unu vorto sed, kiel etimologio sugestas, ĝi konsistas el ismo koncernanta Spiritojn, do necese implikas la ekziston de nemateriaj estuloj, tio estas entoj, kiujn ni povas nek tuŝi nek vidi nek senti nek aŭdi nek gustumi !

Sinteze ni dividas Spiritismon en tri partojn : unue Spiritismo enhavas kristanan moralon, en tiu grado, ke la plej ŝatata kaj legata libro de brazilaj esperantistoj nomiĝas «La Evangelio laŭ Spiritismo».

Due la spiritisma doktrino estas esence reenkarnisma, tio signifas, ke spiritistoj vidas vivon surteran kiel nuran ĉeneron en la longa kaj eterna irado de la animo al la perfekteco, senigante sin laŭgrade de la malvirtoj katenigantaj ĝin en la abismo de la mallumo.

Trie Spiritismo enkalkulas eksperimentan sciencon ĉar kvankam la Spiritoj nemateriaj, ili tamen influas la materian mondon, same kiel la Luno influas la Teron kvankam ĝi ne tuŝas ĝin.

Do sinteze oni povas konsideri Spiritismon kiel religion, ĉar kvankam ĝi ne havas eklezion ĝi alvokas ĉiun homon plibonigi sin sekvante la diajn instruojn de la Kristo. Sed ankaŭ kiel vivfilozofion ĉar la fidplena spiritisto vidas en la malfacilaĵoj de la vivo nurajn rimedojn por paŝi al sia prilumado, siavice necesa por esperi reenkarniĝi en mondo pli tolerema al la malfortuloj kaj pli frateca por la homoj. Ni ne ekskludu la pli praktikan flankon, menciante la mediumajn verkojn, la TKI-n – TransKomunikado Instrumenta – kiu ebligas komu-



Lernantoj de baza Cseh kurso en spiritisma centro

niki kun elkarnaj Spiritoj per televidilo aŭ diversaj radio-aparatoj.

Memevidente, la mediumo estas grava elemento de Spiritismo ĉar per tiu vorto oni celas ĉiun personon, kiu helpas Spiriton manifestiĝi eĉ se li faras tion senkonscie. En Brazilo la famo de Spiritismo estas tiel granda, ke en la kortumoj oni petas de mediumoj, ke ili faru analizojn por helpi trovi la veron en krimaj procesoj; la kodiginto de Spiritismo, la franca Allan Kardec estas tie pli konata ol Napoleono kaj tri milionoj el liaj libroj disvendigis ĉie en la lando. Al la plej fama mediumo, Francisko Candido Havier, oni faris plej imponan funebran ceremonion, kiun envidus ĉiu ŝtatestro.

Kaj krom tiuj konsideroj emfazindas, ke la tieaj spiritistoj tre favoras al Esperanto ĉar multe da favoraj artikoloj pri la internacia lingvo aperis en la revuo *Reformador*, oficiala organo de la brazila spiritisma federacio.

Al tio ni aldonu du famajn librojn el mediumaj fontoj, kiuj konvinkis sincerajn korojn avi-

dajn je lumo kaj vero. La unua, nomata «La Misio de Esperanto» pentras la kulisojn de la kreo de Esperanto en la astrala mondo kaj ĝi fakte konsistas el kvin ĉapitroj de pli granda verko nomata «La postvivado de la Spirito», en kiu la spirita aŭtoro pritraktas diversajn misterojn de la transmondo kaj ties rilatojn kun nia tera sfero.

La dua nomiĝas «Esperanto kiel revelacio» kaj ĝia spirita aŭtoro, la fama esperantisto Francisko Valdomiro Lorenz substrekas la bezonon ĉe la elkarniĝintaj Spiritoj de internacia lingvo kiu malkatenigos la penson de la lingvaj baroj. Pri la ĝenerala aliro de brazilaj spiritistoj al Esperanto oni povas konsideri paragrafeton el la enkonduko de tiu dua libro :

«Dio volu, ke la homoj profitu la idealan instrumenton, kiun Zamenhof postlasis al la Homaro. Lerni Esperanton estas fari paŝon sur la vojo de la morala kaj spirita evoluo. Ĝin disvastigi estas apostola misio».

Mi kredas, ke malfacilus esti pli klara.

*Bertrand Hugon,
kun brazila helpo*

1a BRES (Brazila Renkontiĝo de Esperantistaj Spiritistoj okazos la 13-an, 14an kaj 15an de oktobro 2006)
<http://www.bres.org.br/>

Quand l'étoile verte fait parler d'elle

Un titre qui, ma foi, mérite une explication... Je me suis toujours demandé pourquoi en France l'étoile verte n'apparaissait pas plus souvent sur les sacs, manteaux, etc. des espérantistes, sans jamais recevoir de réponse satisfaisante. «Ça fait secte», «C'est vieux comme truc».

Autant d'arguments que je n'ai jamais considérés comme valables. Il y a quelque temps de cela, lorsque ma faculté était encore bloquée (pour la troisième semaine consécutive !), ne sachant que faire de mes longues journées, je passais de nombreuses heures au QG des grévistes, à organiser, dialoguer...

«On s'en fout, de ta vie», pourriez-vous dire... Mais soyez un peu patient et attendez la suite !

J'ai, accrochée au côté de mon couvre-chef (mon chapeau quoi !), une charmante étoile verte frappée du «E» d'Espéranto, que j'avais achetée à IS à un vendeur brésilien (ça, c'est pour le contexte). Une étoile ayant un pouvoir que je ne soupçonnais pas...

Durant toute la grève, des étudiants m'ont demandé ce que signifiait cette étoile, ou que voulait dire la lettre «E». Une prise de contact facile et très intéressante pour parler de l'espéranto !

Un matin, un nouveau tournant a été franchi puisque j'ai entendu une personne que j'avais «sensibilisée» expliquer à une autre ce qu'était cette langue et que c'était une super bonne idée... Il s'est d'ailleurs ensuivi un petit débat autour de la table du petit-déjeuner !

Pour l'anecdote, une personne qui ne se souvenait pas de mon prénom m'a appelé un jour «mister espéranto». L'atout

incontestable de cette étoile verte est que pas une seule fois je n'ai eu à faire le premier pas pour en parler (ce qui fait parfois un peu propagande), les gens demandaient d'eux-mêmes et étaient donc d'autant plus intéressés. Je me souviens d'une Assemblée Générale un matin alors que les débats interminables faisaient fureur, une jeune fille juste derrière moi



m'a soudainement demandé : «Excuse-moi, c'est bien l'étoile de l'Espéranto sur ton chapeau ? Je l'avais appris quand j'étais jeune !».

Sur une AG de 400 étudiants, combien d'espérantistes sont-ils ainsi cachés ? Comment ne pas s'extasier devant le pouvoir de ce si petit insigne qui fait tant parler de lui ? Ne nous posons plus de questions, chaque espérantiste se devrait d'essayer de porter ce symbole qui permet de parler de l'Espéranto, et de reconnaître les espérantistes quand nous les croisons.

Suis-je un cas isolé ? Non, ma petite sœur a cette étoile sur son sac et a, grâce à cela, parlé de l'espéranto dans sa classe, deux élèves vont depuis à un cours

et parlent d'aller à l'IJK cet été ! Nous avons la chance d'avoir un beau symbole (qui, sur mon chapeau, fait cow-boy), affichons-le ! De même que nos beaux «kalendaretoj» qui siégeaient fièrement sur une des tables du QG de la grève, et occupaient les mains de ceux qui s'ennuyaient...

Voilà, c'est tout. Je tenais à faire ce petit appel afin que chaque espérantiste puisse être reconnu par un autre et parler de cette langue autour de lui ! Notre étoile verte est un superbe insigne qui sait se faire remarquer, alors n'hésitons plus, faisons-lui honneur et portons la fièrement, rien de mieux pour que les espérantistes ne soient plus seulement des bêtes de l'ombre !

J'ai reçu plusieurs témoignages de personnes qui l'avaient portée et avaient grâce à elle rencontré des espérantistes dans des circonstances inattendues ! Quelqu'un m'a également parlé d'autocollants espérantistes sur sa voiture et d'une grosse étoile verte sur ça boîte aux lettres située sur un chemin de grande randonnée, et qui apparemment faisait parler les randonneurs !

Aussi pouvons-nous conclure :

«Si tous les espérantistes en faisaient autant, nous progresserions plus vite tellement la pub est importante !».

Quelqu'un m'a aussi demandé où on pouvait se procurer ce genre de gadgets espérantistes !

Une piste pour la boutique ?

Vivu la stel', vivu la stel',
vivu la verda stel' !

Sebeto (Sébastien Merlet)

Nova luno

Se brilas la nova luno,
alkuras la hom lupo

Zamenhofa poverbo



Por tiuj jam morditaj...

Kiel jam dirite, ili ĝoju ĉar, post longa atendado kaj multaj prokrastoj, eldoniĝis fine de pasinta marto la unua krompakajo nomita **Nova Luno**. Tiu nova skatolo proponas novajn ideojn, variantojn, kaj rolojn, kiuj povas pliriĉigi la bazan ludon. Inter tiuj novaĵoj, plej prezentindas la ĝuste nomita “nova luno” kiu uzas novan kartaron “eventoj”. Ĉiun matenon, la gvidanto eltiras unu “evento-karton” kiu starigas efektojn sur la ludo provizore aŭ ĝis la fino. Estas sume 36 evento-kartoj. Jen kelkaj ekzemploj :

“*Granda Malfido* - ventego de malfido bloviĝas tra la vilaĝo. La vilaĝanoj havas po 2 voĉojn uzotajn por montri siajn preferatajn amikojn. La voĉdono okazu samtempe, per ambaŭ manoj, ĉe la signalo de la ludestro. Se unu aŭ pluraj ludantoj ricevis nenium voĉdonon, ili estu elludigitaj.”

“*Somnambulismo* - la klarvidulino fariĝis somnambula. Ekde nun ĝis la fino de la ludo, la ludestro laŭte eldiros la sekretan identecon de la persono, kiun ŝi montris. Tamen, oni daŭre plu ne scios kiun ludanton ŝi spionis.”

“*Bonaj kondutoj* - vi estas gentilaj vilaĝanoj: estas malpermesite interrompi ies parolon. Ĉiu parolu laŭvice, sub kontrolo de la gvidanto. Ĉia ludanto, kiu kontraŭiras tiun regulon, perdas sian rajton voĉdoni dum tiu ludvico.”

Ankaŭ plaĉos al vi la “spiritismaj” kartoj, kiuj ebligas fari rondon gvidatan de spiritisto, kiu alvokas mortinton por fari al tiu ĉi unu demandon. Inter la eblaj demandoj estas : “*ĉu tiu ludanto estas simpla vilaĝano ?*”, “*ĉu unu el la homlupoj estas urbestro ?*”, “*ĉu tiuj du ludantoj estas el la sama flanko ?*”, “*ĉu unu homlupo estas fumanto ?*”...

Se vi kutimas frekventi la esperanto-sekton, eble vi jam renkontis disĉiplojn de sekreta sekteto kiu enĉambriĝas nokte por aranĝi strangajn kunvenojn en rondo... Se vi jam aŭskultis ilin interparoli, vi jam notis mirindajn sekretajn vortojn nur de ili kompreneblaj kiel “SoVo”, “SoPoVo”, “homlupo”, “klarvidulino” aŭ “pafisto”. Kelkaj eĉ atestas ke dum siaj nigraj mesoj ili faras strangajn manmovojn !

Feliĉe, tiu sekteto ne tre danĝeras kaj nur kontentiĝas ludante la tiel nomitan “homlupan ludon”. Kaj, feliĉaj sektanoj, ili nun povas konatiĝi kun la nova krompakajo, kiun eldonis fine de marto la kreintoj de la ludo, Philippe des Pallières kaj Hervé Marly⁽¹⁾.

Por la senpekaj ŝafidoj...

Por la nekonantoj, kelkaj bazaj klarigoj estas necesaj. La principo simplas: la partoprenantoj (inter ok kaj dek ok personoj) ludas la rolon de vilaĝanoj, el kiuj kelkaj estas sekrete homlupoj. Tiuj ĉi agas tute normale dum la tagoj, sed vekiĝas ĉiunokte por formanĝi unu el siaj malfeliĉaj kunloĝantoj. Tage, la sinceraj kaj bonaj vilaĝanoj klopodas eltrovi unu el la homlupoj kaŝitaj inter ili, ekzekutante iun, kies konduton ili juĝas suspektinda (ofte malprave) ! Kompreneble, la ludo tiel daŭras ĝis unu flanko fine sukcesas elludigi la alian.

Kiel konkrete okazadas ĉio ĉi? Gvidanto, kiu ne mem partoprenas sed mastrumas la ludon, komence disdonas po unu sekretan karton, kiu difinas al ĉiu ties rolon. Dum la nokto, ĉiuj vilaĝanoj fermas la okulojn, kaj la gvidanto vokas tiujn, kiuj ricevis homlupo-karton. Tiuj ĉi vekiĝas por silente montri tiun, kiun ili formanĝas, kaj redormas. Dum la tago, la vilaĝo unue ekkonas la viktimon de la pasinta nokto, kiu montras sian karton kaj ne plu rajtas paroli. Post debato, en kiu ili diskutas pri tiuj (eventuale) suspektindaj pro homlupeco,

ĉiuj vilaĝanoj (eĉ la homlupaj !) mane voĉdonas por elekti tiun ekzekutendan. Tiu ĉi siavice forlasas la ludon montrante sian karton. Komenciĝas nova nokto, kaj tiel plu.


Sed por spicigi kaj kompliki la aferon, ankaŭ ekzistas aro da vilaĝanoj kun sekretaj specialaj kapabloj. Tiuj ĉi kompreneble ne estas konataj, sed ili havas la gravan rolon helpi la aliajn en ilia tasko senmaskigi la homlupojn... Mi ne detaligos ĉiujn ĉi specialulojn, krom unu kies rolo estas gravega: la klarvidulino. Ŝi havas la potencon kapablon ekscii la sekretan identecon de unu ludanto ĉiunokte. Kiam ekdormis ĉiuj, la gvidanto vokas ŝin antaŭ la homlupoj, kaj ŝi montras tiun, kies identecon li malkaŝu al ŝi. Tage, ŝi devos uzi siajn informojn por akuzigi la homlupojn malkovritajn de ŝi, aŭ senkulpiĝi la aliajn. Sed ŝi estu lerta kaj diskreta, ĉar la homlupoj serĉadas ŝin por salti sur ŝin ĉe la unua okazo !

La aliaj vilaĝanoj havantaj specialajn kapablojn ne estas nepre uzendaj, sed ĉiu el ili havas sian propran rolon en la batalo kontraŭ la homlupo kaj aldonas plian intereson al la ludo. Nur menciindas iliaj nomoj: la sorĉistino, la urbestro, la ŝtelisto, la knabineto, la ĉasisto, kupidono kaj la amantoj.

La homlupa ludo, kiu estas fakte adaptaĵo de malnova ludo el Rusio (konata per la nomo “mafia”), kreas viglan interparolan etoson, kaj fortan dependecon ĉe la ludantoj. En pluraj okazoj, oni vidis frenezulojn ludi tutan nokton ! En la esperanto-medio, ĝi jam pruvis sin ne nur plaĉa sed bonege paroliga kaj interkoniga ekzerco - tiel taŭga por komencantoj kiel por pli spertaj esperantistoj. La interesatoj trovos la plenan regularon de la ludo en esperanto en la retejo de JEFO⁽²⁾.

(1) <http://lesloupsgarous.free.fr/>

(2) http://esperanto-jeunes.org/article.php3?id_article=139



Kompreneble, mi ne priskribos ĉiujn naŭ variantojn disponigitajn de *Nova Luno*... Vi konatiĝu mem kun la freneza "Rikoltofesto" (kie ĉiuj vilaĝanoj ne plu agas normale pro troa ebrieco), kun la komplikita "Duobla Mi" (kie ili havas du identecojn) aŭ kun la konfuziga "Nigra Pesto"... En *Nova Luno*, la muroj parolas, la homlupoj kapablas fascini anstataŭ mortigi, kaj oni laŭdire eĉ povas ludi ducentope!



Sed ne nur novaj manieroj ludi estas proponitaj. Ankaŭ estis atendataj novaj personoj, kaj ili alvenis. Novaj roloj kun novaj kapabloj en la lukto kontraŭ la lupoj. Iliaj nomoj estas la Stultulo, la Saĝulo, la Saĝulo, la Savanto kaj la Flutisto. Tiuj ĉi du lastaj estas la plej interesaj: mi prezentu ilin.

La Savanto (jam antaŭe konata en privataj rondoj kiel la "ekzorcisto") havas la potencon kapablon protekti po unu ludanton ĉiunokte kontraŭ la atako de homlupoj. Li estas vokita tuj post la noktigo, antaŭ la klarvidulino, kaj elektas sian protektoton. Tiu ĉi bonŝanculo transvivos al ĉia eventuala atako de la homlupoj. Tiukaze, la gvidanto anoncos neniun viktimon matene, sen plia klarigo. La Savanto rajtas protekti sin mem, sed ne la saman ludanton dum du sinsekvaj noktoj.



La Flutisto estas ia "memstara" persono kiu, kiel la amantoj, sekvas sian propran vojon. Iam forpelita de la vilaĝo, li revenis post multaj jaroj sub malvera identeco. Li nun ne pensas pri io alia ol venĝi sin... ĉiunokte, li vekigas laste, antaŭ la fino de la nokto, kaj "ĉarmas" per sia fluto du ludantojn, kiujn li elektas, kaj redormas. Tiam, la gvidanto tuŝas la kapon de la ĵus ĉarmitoj, kaj demandas ke ili, kun ĉiuj jam ĉarmitaj ludantoj, vekigu por tiel rekoni unu la aliajn. Kiam ĉiuj ludantoj estas ĉarmitaj... gajnas la flutisto! Pro tio, ambaŭ flankoj, la homlupa kaj la vilaĝano, bezonos rapide eltrovi la flutiston, kaj la ĉarmitoj ne emos elludigi ankoraŭ ne ĉarmitan



ludanton por faciligi lian venkon. Sed ju pli pasas la tempo, des pli grandas la risko por la flutisto, ĉar li kaŝas sin inter pli kaj pli malmultaj ludantoj!

Se vi ne plu kapablas atendi, se la homlupeco tro tiklas vin, *Nova Luno* aĉetebblas en ĉiuj ludovendejoj por sama prezo kiel la bazskatolo (9 eŭroj). Bonaj vesperoj inter amikoj estas antaŭvidataj... Alikaze, ĉiujn detalojn pri la ludo vi verŝajne malkovros en venonta esperantorenkontigo. Nur demandu pri la frenezuloj kiuj lupumas tutan nokton, kaj oni indikos al vi, kie vi trovos nin.

Christophe

En 1943, Herman Hesse aperigis utopian romanon, kie fikcia ludo tiklas kun la ideo de universala lingvo. Eĉ se ĝi neniel parolas pri nia lingvo, tiu libro laŭ diversaj aspektoj tamen ege rilatas al Esperanto.

Lingvemaj logikemuloj

Ĉu vi jam rimarkis? En nia movado svarmas komputilistoj, matematikistoj kaj ceteraj malvarmaj kalkulemuloj. Fakte, ĉiam estis tiel, kaj eĉ antaŭ la oficiala apero de nia lingvo, la temo «universala lingvo» jam estis afero de logikemuloj.

Raimundo Lullo⁽¹⁾ (1233-1316), estas unu el la eŭropaj pensuloj kiuj opiniis, ke logiko estas

Jomo slavumas

L'Europe de l'est comme si on y était

Ce nouveau disque de Jomo était vraiment dans le thème du dernier JI consacré aux Balkans mais l'album n'a paru que début mai.

Écouter cet album surprenant est donc l'occasion de prolonger cette visite. En effet Jomo, attaché aux pays de l'Est, y va souvent et en profite pour apprendre de nouveaux instruments ou mélodies traditionnelles. Ces voyages se font sentir dans les textes et le style dépaysant.

24 titres vont te donner envie de danser, chanter ou t'apporter un brin de nostalgie. J'ai assisté à une partie de l'enregistrement et deux chansons me sont restées en tête six mois («Jen pluaj foj» et la «Ĉuvasa arto»). La voix d'Irina (non espérantiste) est présente presque partout et celle de Jomo est parfois plus grave, à se sentir dans un concert russe.



en vente 18 € à la boutique

Depuis longtemps, il se produit sur scène avec un groupe slave (*Solnichka* et en costume!) ainsi qu'avec les *Libertarios* et présente ici des chansons originales ou traduites, certaines en relation avec l'espéranto. A noter une adaptation de «Sola», très connue dans les rencontres de jeunes.

Armelle

Une belle surprise t'attend si tu visites le site «base de données» des artistes espérantistes :
http://artista.ikso.net/eurokka/novajx/jomo_fr.php
 (voir aussi le site de Vinilkomo, éditeur du CD où se trouve un extrait en mp3).

La ludo de la vitroperloj

komuna bazo por interhoma kompreno: li mem tiom certis pri tio, ke li plurfoje transiris la Mezmaron por havi teologian diskuton kun la islamanoj, kiujn li esperis konvinki helpe de kombinatorika ilo de li koncipita, kiu generas nur verojn. Lia lasta klopodo estis tamen eble pli truda ol konvinka, ĉar Lullo estis mortŝtonigita de siaj kolerigitaj aŭskultantoj.

Same kiel Lullo, sed sen riskisian vivon, la granda filozofo Leibniz (1646-1716) revis ankaŭ pri logike bazita universala lingvo. Li skribas en sia «Scientia generalis»:

«Jen kion ni atingu: ke ĉiu paralogismo⁽²⁾ ne estu alio ol kalkul-eraro kaj ke ĉiu sofismo, esprimata per tiu nova skribo, estu vere nura solecismo⁽³⁾ aŭ barbarismo, facile korektebla per la solaj leĝoj de tiu filozofia grammatiko.

Tiam, ne plu necesus interdu filozofojn pli longaj diskutadoj ol inter du matematikistoj, ĉar sufiĉus ke ili prenu sian skribplumon, sidiĝu je sia kalkultablo (...) kaj diru unu al la alia: «Ni kalkulu !»

Ludo kaj lingvo

Bela revo, fakte, kiun Zamenhofo ne tute plenumis: kvankam iom logike konstruata, multe pli ol la «naturaj» lingvoj ĉiukaze, nia lingvo ne ebligas la solvon de problemoj per simpla kalkulado.

Oni do povas kompreni ke la revo de Leibniz pluvivis eĉ post 1887. Unu enkorpiĝo de tiu revo estas la ludo de la vitroperloj, centra temo de la samnoma kvazaŭ scienc-fikcia romano⁽⁴⁾ de Herman Hesse (1877-1962).

La ludo estis unue hobia de muzikteoriistoj. Matematikistoj transprenis ĝin kaj pluevoluigis ĝin, ĝis fakuloj de ceteraj kampoj malkovris la eblecojn de la ludo por la propra fako:

«Kio nun mankis al tiutempa ludo de la vitroperloj, estis la kapableco de universaleco, la ebleco ŝvebi super la fakoj. Astronomoj, helen-, latin-, skolastikfakuloj⁽⁵⁾ kaj muzikstudentoj ludis sian sprite regulatan ludon, sed la ludo havis por ĉiu fako, ĉiu esplortemo kaj ties disbranĉoj propran lingvon kaj propran regularon.»

Sed iam, la vojo al universaleco de la ludo malfermiĝis, dank'al sennoma geniulo, kiun oni aludas per *lusor basiliensis*, la ludanto de Bazelo:

«Li inventis por la ludo de la vitroperloj la bazojn de nova lingvo, fakte de simbol- kaj formulingvo, en kiu matematiko kaj muziko samgrade partoprenis, kaj kiu ebligis kunligi astronomiajn kaj muzikajn formulojn, meti matematikon kaj muzikon super la saman denominatoron. (...)

La ludo de la vitroperloj, iam speciala okupo de la matematikistoj, de la filologistoj⁽⁶⁾, aŭ de la muzikistoj, logis iom post iom ĉiujn verajn intelektulojn en sian poststrion. Diversa malnova akademio, loĝio kaj precipe la praa Ligo de la Orientvojaĝantoj turnis sin al ĝi.»

Knecht kabeas kastalie

Preter la ludo, naskiĝis Kastalio, utopia ordeno, simila al tiuj religi-intelektaj ordenoj pri kiuj Lullo revis (li ne nur revis pri logika universaleco!), simila eble al tiuj Jezuitoj⁽⁷⁾ kun kiuj Leibniz tiel ofte rilatis. Sed male al la Jezuitoj, Kastalio kredas ne je Dio, sed je la ludo, kaj celas ties disvolvon, kaj sekve la disvolvon de la ceteraj sciencoj.

La romano prezentas al ni la vivon de unu altrangulo de la ordeno, Joseph Knecht (germanlingve, la servulo): Lian edukadon, lian malkovron de la ludo, lian supreniron ĝis la pintaj postenoj de la ordeno, kaj lian finfinan forlason de Kastalio.

Ekde 1968, multaj gejunuloj legis la libron kiel defendon de la individua rajto, libervole elektisian vojon al disvolviĝo, kaj multaj samideanoj certe povas rekoni sin en la kontraŭ-aŭtoritata atitudo de Knecht. Sed ili legu pli atenteme tiun libron: Klare oni povas rekoni «la universitaton» en Kastalio, aŭ kiu ajn grava institucio; tamen tiu Kastalio, per sia utopia naturo mem, estas ankaŭ tute komparebla kun nia propra movado, kaj eble en la diversaj kritikoj al Kastalio, eblas tralegi elementojn por prilumi tiun ankoraŭ ne tute komprenatan sed karakterizan fenomenon de nia Esperantio: la kabeado⁽⁸⁾.

Ceteraj universalajoj

Ni ankaŭ povus tradiskuti la guston de Hesse por la iama kaj la eble onta internacia lingvo: la latina kaj la ĥina, aŭ longe prikomenti la gravecon de la oraklo Ji-king en la romano. Sed endas konkludi; ni nur aldonu ke la Ji-King, konsistanta el ses bastonetoj laŭhazardo ĉu truej ĉu plenaj, ĉu jingaj ĉu jangaj, ĉu nulaj ĉu unuaj, havas evidentan similecon kun la sola universala lingvo, kiun Leibniz finfine inventis: la binara nombrosistemo, bazo de la komputila kalkulo.

François Hoeltzli

Notoj:

- (1) Se Raimundo Lullo, Leibniz, kaj la tuta lingvema logikemularo interesas vin, kuraĝu tralegi la «Serĉado de la Perfekta lingvo» de U. Eco!
- (2) Paralogismo, sofismo: erara rezonado. Vd. NPIV por diferenco inter ambaŭ terminoj.
- (3) Solecismo, barbarismo: kruda lingva eraro. Vd. NPIV por diferenco inter ambaŭ terminoj.
- (4) Nedisponblas en nia lingvo. Legeblas franclingve sub nomo: «Le jeu des perles de verre».
- (5) Skolastikismo estas la mezepoka filozofimetodo, ofte ridigita de la posteuloj. Sed Hesse laŭde parolas pri ĝi, ĉar skolastikismo evoluigis la metodojn de vere solida rezonado. Vi eble jam aŭdis pri la razilo de Okham? Li estis fama skolastikisto.
- (6) Scienco de la malnovaj lingvoj
- (7) La intelekta ordeno de la katolikoj, kiu celas konverti la elitojn (de la fremdlandaj precipe)
- [8] Kabei: Fari kiel Kabe, forlasi la esperantismon post vigla kaj sukcesa partopreno en la movado.



La Festivalo de Cannes

tra la lingva, la Nica kuirarta kaj kinoŝatanta vidpunktoj

Merkrede, la 17an de majo. Mi enpakas miajn lastajn aferojn, forveturante al Festivalo de Cannes... kaj ne havas tempon finverki la artikolon pri forceja efiko promesitan por la JI. Cele al gajni iom da tempo, mi promesas anstataŭe verki raporton pri la festivalo tuj post mia reveno.

Dimanĉe, la 28an de majo. Mi elpakas miajn lastajn aferojn, reveninte el Festivalo de Cannes... kaj demandas min, kiel raportu pri tiu evento el esperantista vidpunkto. En la esperantistaro ja ne estas pli da kinoŝatantoj ol en la averaĝa loĝantaro...

Lingvofestivalo...

...sed tute certe estas pli da lingvemuloj, kaj internacia filmfestivalo iel ankaŭ estas lingvofestivalo. Se mi logike farus liston de lingvoj aŭditaj dum la filmoj, jen kio estus la rezulto: franca, angla, itala, germana, hispana, kataluna, portugala, norvega, rumana, hungara, rusa, ĉina, korea, japana, araba, ruanda, yolngua. (jes, yolngua! mi ne dubas ke la ĉefredaktoro trovos bonkorulon por verki klarigan artikolon pri tiu lingvo en la venonta JI).

Noto de la ĉefredaktoro: La Yolnguoj estas indiĝena popolo loĝanta en la nord-orienta Arnhem-Lando en Aŭstralio. Mi ne havas multe pli da informoj pri tio kaj mi timas ke neniun redaktanto bondezirus skribi (kaj antaŭe serĉus) pri la Yolngua lingvo

Inter esperantistoj ankaŭ estas kelkaj defendantoj de la franca lingvo, kaj eble ilin interesus scii, kiel ĝi fartas en granda evento kaj franca kaj internacia: oni ja povas supozi, ke la premo de la « internacia » lingvo (ne, mi ne parolas pri esperanto, sed pri la angla...) forte suferigas la francan. Fakte, ĝis nun, ne tro; la franca restas la plej grava lingvo. Jen trafa ekzemplo: la franclingvaj filmoj estas montrataj kun anglaj subtitoloj; la anglalingvaj

kun francaj subtitoloj; kaj la aliaj (italaj, germanaj, ... yolnguj) kun francaj subtitoloj sur la ekrano kaj aldonaj anglaj subtitoloj sur kroma elektrona tabulo sub la ekrano. Estas do multe pli facile sekvi la filmojn, kiam vi legas la francan!

Ankaŭ la filmteamoj, kiuj surscenejiĝas antaŭ la filmo por prezenti ĝin, strebas alparoli la spektantojn en la franca, almenaŭ per kelkaj salutvortoj, sed ofte la tutan paroladon. Ekzemple, eĉ Al Gore (« eksa onta Usona prezidento », kiel li mem sin ŝerce nomas) prezentis sian dokumentfilmon pri forceja efiko per franca parolado. Mi ne dubas ke la ĉefredaktoro, kiu jam trovis bonkorulon por verki sciencan artikolon pri forceja efiko en la venonta JI, ĝojos ke tiu dokumentfilmo estos aludita en tiu artikolo...

Noto de la ĉefredaktoro: Mi timas ke Manu mem proponis artikolon pri efikoj de aviadiloj pri la klimato... Leginda en la venonta numero!



Nica gastronomio...

Tiu bona parto de la franca validas tamen nur por la Festivalo, kaj ne por la samtempe okazanta Filmbazaro. Tiu evento estas tute komerca (kaj ne arta) kaj tial uzas la solan komerclingvon: la anglan. Eĉ la francaj filmoj estas propaganditaj en la urbo per anglalingvaj afiŝoj (kaj do per anglalingvaj titoloj) por allogi la eventualajn eksterlandajn aĉetantojn.

Inter esperantistoj ankaŭ estas defendantoj de regionaj lingvoj. Nu, por ili mi ne povas tiel favore raportu: neniun spuron de la okcitanana mi trovis tie. Aŭ eble unu:

mi kelkfoje manĝis *pan-bagnat*, kiu estas tipa nica sandviĉo, kaj kies nomo signifas en la nica « pano banita ». Ĝi tradicie estas runda paneto, distranĉita en du partoj banitaj de olivoleo kaj iom da vinagro, kaj pleniĝita de tomatoj, ovoj, tinuso aŭ anĉovo, olivoj, cepoj, kukumoj, ktp. Sed evidentiĝas ke multaj sandviĉvendistoj eĉ ne komprenas la originan nican signifon: ili metas kelkajn el tiuj ingrediencoj en sekan « bagetan » panon, kaj nomas ilin tamen *pan-bagnat*.

... kaj kino!

Inter esperantistoj eble estas tamen kelkaj kinoŝatantoj. Por ili, mi ŝatintus recenzi la filmon *Babel*, kies titolo ja allogas nin, kiuj bone konas la homon kiu defiis Babelon!

Laŭ la reĝisoro (li intertempe ricevis la premion de plej bona reĝisoro), la filmo ne rekte temas pri la lingvaj problemoj, sed pli ĝenerale pri la disigoj inter homoj. Tion mi ne povas konfirmi, ĉar la vico por spekti ĝin estis tro longa (strange, JI ne estas en tiuj gazetoj, kies korespondantoj havas prioritaton por eniri la salonojn). Mi tamen scias ke tiu filmo uzas almenaŭ kvar lingvojn (angla, hispana, araba, japana) sed ne la yolnguan. Mi ne dubas ke la ĉefredaktoro trovos bonkorulon por verki instigan artikolon pri tiu filmo en la postvenonta JI.

Noto de la ĉefredaktoro: Bonkorulon... Bedaŭrinde mi konas nur unu kinospecialiston en la JI-redaktoteamo...

Lunde, la 29an de majo. Mi relegas mian artikolon. Mi timas ke raporto pri Cannes ne interesus legantojn esperantistajn...sed ĉu estis saĝe anstataŭe paroli pri Al Gore, sandviĉoj kaj nespektita filmo? Mi ne dubas, ke la ĉefredaktoro scios kion respondu al tiu demando....

Manu

Hagège kaj Esperanto

L'âge de raison ou Hagège strâtege ?

Vidpunkto de esperantisto pri la nova libro de Claude Hagège

«**Combat pour le français : Au nom de la diversité des langues et des cultures**»

Ĉu nova amiko de Eo, aŭ strategie diplomata por eviti kritikojn de Esperantistoj? Laŭ mi -- vidu la raporton pri nia renkonteto en la Librofoiro⁽¹⁾ -- la respondo klaras, bedaŭrinde. Mi klarigos poste. Ni komencu tamen pozitive. Ne la tuta libro forjetendas.

Nuraj utilaj kaj interesaj aferoj en sia libro

→ Estas interesa analizo (p.40-46) pri la 2 diversaj manieroj, laŭ kiuj iu superrega lingvo premas al aliaj: **la interna kaj la ekstera aksoj** (*l'axe interne et l'axe externe*).

La **interna akso** signifas, ke iu lingvo prunteprenas el la superrega lingvo multajn vortojn, kaj se la pruntado superas certan kvanton, estas danĝero por la lingvo. Tio ne estas la plej grava minaco en Francio.

Pli danĝeras la **ekstera akso**, tio estas, ke unu lingvo anstataŭas la landan lingvon. Ke oni preferas paroli la superregan lingvon anstataŭ la landan en pli kaj pli da kampoj, nome financo, komerco, universitata instruado, reklamado kmp. Tiu ekstera akso tre danĝeras, ĉar la anstataŭata lingvo tutsimple estas malaperonta!

→ La konsciigo, ke gravas gvidi aktivan lingvo-politikon

Kiel ilustras jena eltiraĵo el recenzo aperinta rete: (...) *de grandes voix étrangères et françaises (Claude Hagège : Combat pour le français...) viennent de sonner l'alarme et appellent des actes.*

Aŭ la komunikado dissendita de la asocio Defendo de Franca Lingvo (DLF), je apero de la libro, 21-an de januaro 2006: *Cet ouvrage, qui témoigne des hautes compétences linguistiques du professeur au Collège de France, est surtout, comme son titre l'indique, un véritable appel au combat pour la préservation de la langue française mais aussi de la diversité linguistique.*

Krome, estas kelkaj interesaj analizoj pri ligo kinaro-lingvo, la disvastigo de la angla, la ebla rolo de enmigrintoj, la netaŭgeco de la ekonomia argumento favore al la angla ktp. Sed malgraŭ tio, Hagège ne konvinkas nin.

«Hagège exagère»

Malpozitivajoj:

Foresto de mencioj pri la lasta libro de Robert Phillipson «English-only Europe» kaj pri la Raporto Grin. Eble tiu lasta ankoraŭ ne aperis, kiam Hagege finverkis sian libron, kiu finpresigis januare 2006.

Rimarkindas, kaj tre bedaŭrinde, la foresto de tiuj 2 mejloŝtonaj verkoj en la kampo Eŭropa lingvopolitiko dum la lastaj jaroj. 2 verkoj, kiuj pledas por iom alispeca lingvopolitika, kiuj ne -nur- politik-korekte defendas la nerealisman plurlingvismon.

Kritikinda titolo, kaj celo :

Protekti la francan lingvon, je la nomo de la lingva kaj kultura diverseco. Fakte la titolo estas signifoplena. La celo de justa eŭropunia lingvopolitiko neniel estu defendi, aŭ batali por, la franca lingvo!! Tiurilate, multe pli bonas la vidpunkto de Phillipson. Ĉu ni volas nur-anglan Eŭropon? Certe ne. Hagege ankaŭ ne. Sed ĉu la batalo konsistu el promociado de alia nacia lingvo de EU? Mi daŭre ne komprenas, kial nefrancoj havus avantaĝon lerni la francan aldone al la angla. Kial ili subtenus plurlingvismon, konsistantan en aldono de la franca al la nepra angla? Kial devi lerni plian lingvon, se la angla sufiĉas por komuniki?

Kontestinda solvo :

Hagege defendas, kiel solvon al la hegemonio de la angla, kiel lingvan sistemon por EU, plurlingvismon, tio estas, ke li tute akceptas, ke iuj lingvoj estu pli gravaj ol la ceteraj. Unue, li proponas trilingvan relaksan sistemon. Poste, por pli malpliigi la kostojn, pri oficialigo de 3 lingvoj. Do fakte, pli precize, temus pri trilingvismo: la angla, la franca kaj la germana estus la naturaj kandidatoj al EU-oficialaj lingvoj. Tia sistemo estas nomata ĉe Grin «oligarkia sistemo». Al tiu triopo oni povus

eventuale aldoni la hispanan kaj la italan. Kio igus la sistemon tro peza. Sed ĉiel, kiel la nomo montras, tiu sistemo tre maljustas ankaŭ! Kial ĉiuj aliaj lingvanoj favorus sistemon, pli koston ol unulingvismon, ekskludantan sian lingvon, devigantan ilin lerni ne unu lingvon, sed 2 aŭ 3?

Ĉu Hagege ne konscias,

1. ke tiu sistemo ankaŭ estus ege maljusta? Kial tiuj lingvoj, kaj ne la pola, ekzemple? Kaj tiel plu. [Sen eĉ paroli pri la kataluna, regiona lingvo pli multe parolata ol kelkaj plenoficialaj EU-lingvoj.

2. Ke ĝi estus tamen pli kosta ol sistemo kun nur la angla?

3. Kaj ke nature, kiel okazas nuntempe, la sistemo «glitus» al angla unulingvismo?! Estus tre malstabila modelo. Vidu kio okazas en la Eŭropa Komisiono, kiu jam havas 3 laborlingvojn. Malpli ol 10% de la tekstoj estas verkitaj germane, kaj ĉirkaŭ 30% nur en la franca.

Malgraŭ ŝajna subteno de Esperanto, nekomprene de ĝia utilo

Kiel oni povas, sampaĝe, skribi unue «*Esperanto certe estas unu el la plej bonaj aliancanoj de plurlingvismo*», kaj poste «*Sed por tiuj, kiuj strebas al tio, ke Europa Unio uzu nur unu lingvon, la problemo estas difini, ĉu tiu lingvo estu ilo au speculo*». Por tiuj, kiuj ne kredas je la uzo de unusola lingvo, tiu demando, evidente, eĉ ne stariĝas. Evidente, Hagege ne komprenis, kiel Esperanto povus roli, mi dirus kiel «Eŭropa-Lingvopolitika lingvo» (mallonge ELP-lingvo). Lingvo, kies uzo ebligus justan, efikan plurlingvismon, kiel relaksa lingvo en interpretado kaj tradukado. Vidu la teknokratian sistemon priskribitan de Grin⁽²⁾ en artikolo tamen citita en bibliografio (p. 242) de la libro.

La pri-Esperanta ĉapitreto konfirmemas, ke Hagege verkis ĝin, kiel «haron sur la supon», por antaŭeviti la kutimajn kritikojn de Esperantistoj, por povi diri al ili «vidu, mi parolis pri Esperanto!». (Vidu mian raporton pri la Salon du Livre). Ve, la manovro rimarkinde fiaskas.

Resume kaj konklude, se mi devus konsili al vi legindaĵojn en la kampo Eŭropa Lingvopolitiko, nepre legu la librojn de Phillipson. Certe Hagège estas talenta lingvisto, sed pri la temo «justa kaj efika lingvopolitiko por Eŭropo», li ankoraŭ ne tiom kompetentas kiom ni :)



(1) <http://fr.groups.yahoo.com/group/jefo-membroj/message/3198>

(2) www.russieonline.free.fr/grin.htm

JEFO-estraro / bureau d'Espéranto-Jeunes

| | | |
|--|---|---|
| Prezidanto : Axel Rousseau | 26, rue Boussingault / 75013 Paris | tél. : +33 6 63 70 11 32 / axel@esperanto-jeunes.org |
| Vic-prezidanto : Sébastien Merlet | 4, route de la Raimbaudière / 41800 Houssay | tél. : +33 6 77 37 49 88 / sebeto@esperanto-jeunes.org |
| Kasistino : Julia Hédoux | 45, avenue Charles de Gaulle / 62200 Boulogne-s/mer | tél. : +33 6 17 06 80 70 / julia@esperanto-jeunes.org |
| Vic-kasisto (et relations TEJO) : Sébastien Montagne | 6 résidence Pasteur, 21 rue des Ormeaux 49100 Angers | tél. : +33 2 41 41 08 23 / sebastien@esperanto-jeunes.org |
| Sekretario : Cyrille Pouillet | 103, av. Verdier / 92120 Montrouge | tél. : +33 6 77 28 13 25 / cyrille@esperanto-jeunes.org |
| Vic-sekretario : Aleks Kadar | 13, av. de Wagram / 75017 Paris | tél. : +33 1 44 09 84 39 / aleks@esperanto-jeunes.org |

JEFO-komitato / conseil d'administration

| | | |
|----------------------|---|--|
| Alexandre Poulet | 9, rue Camille Saint-Saëns / 95480 Pierrelaye | tél. : +33 1 34 21 99 84 |
| Belonia Gabalda | 40, chemin des Berges / 91290 La Norville | belonia@esperanto-jeunes.org |
| Benoît Fonty | 10, rue Bonne Louise / 44000 Nantes | tél. : +33 2 40 69 48 95 / benoit@esperanto-jeunes.org |
| Christophe Chazarein | 200, rue Ursule Devals / 82000 Montauban | tél. : +33 6 84 44 20 18 / christophe@esperanto-jeunes.org |
| Emmanuel Debanne | 8, rue de Cotte / 75012 Paris | tél. : +33 6 68 33 78 14 / emmanuel.debanne@free.fr |
| Enguerran Massis | 27 rue Auguste Bravard / 63500 Issoire | tél. : +33 4 73 89 96 18 / godot1@voila.fr |
| Fabien Tschudy | 6 rue des Cavaliers / 68700 Aspach le Haut | tél. : +33 6 87 20 67 31 / fabien.tschudy@esperanto-jeunes.org |
| François Parchemin | Chemin du Font du Broc Quartier ste Roseline 83460 les Arcs-sur-argens | tél. : +33 6 77 12 56 61 / parch.parchemin@laposte.net |
| Grégoire Colbert | 63, rue de la Tour D'auvergne / 77185 Lognes | gcolbert@voila.fr |
| Maxence Dupuis | 5, rue Guillemilot / 75014 Paris | tél. : +33 1 43 20 31 67 / maxence@esperanto-jeunes.org |
| Pascal Leclaircie | 10, rue Jean-Jaurès / 91300 Massy | tél. : +33 6 66 28 02 30 / pascal@esperanto-jeunes.org |
| Pierre Gontier | La Huardière / 50540 Isigny | tél. : +33 6 83 71 04 13 / pierre.gontier@esperanto-jeunes.org |
| Sébastien Erhard | 13 TER rue Raymond Botté / 76380 Canteleu | tél. : +33 6 15 21 48 93 ou 06.15.21.48.93. |
| Tatyana Malazh | 4, rue Florence Blumenthal / 75016 Paris | tél. : +33 6 78 11 12 33 / tania0282@yandex.ru |

Coordinateurs régionaux

| | | |
|---|---|--|
| Violette Walther - <i>Alsace</i> | 6 rue Philippe Rueff / 67800 Bischheim | tél. : +33 6 81 74 05 56 / walter.violette@wanadoo.fr |
| Magali Lajus - <i>Aquitaine</i> | 1, les Places / 33910 Sablons | magalilajus@yahoo.fr |
| Pierre Gontier <i>Basse-Normandie</i> | La Huardière / 50540 Isigny | tél. : +33 2 33 48 04 67 / pierre.gontier@esperanto-jeunes.org |
| Vincent Pacheu <i>Provence-Alpes-Côte d'Azur</i> | Vallon de la Tour de Keyrié 13100 St-Marc-Jaumegarde | tél. : +33 4 42 24 95 83 / ahirom4@hotmail.com |
| Sébastien Erhard - <i>Bretagne</i> | 36 B, rue de la Corderie / 22000 St-Brieuc | tél. : +33 6 15 21 48 93 ou +33 2 96 68 55 21 henrri@esperanto-jeunes.org |
| Alain Droyer - <i>Bourgogne</i> | 14, rue Maxime Guillot / 21240 Talant | tél. : +33 3 80 55 68 83 / alain.droyer@esperantoland.org |
| Xavier Dewidhem <i>Nord-Pas-de-Calais</i> | 1, allée de l'Archerie / 59800 Lille | tél. : +33 3 20 04 12 15 ou +33 6 75 60 14 75 dewidhem@lve-esperanto.com |
| Maïté Gayet - <i>Ain</i> | les Vignes / 01310 Montcet | maitochette@hotmail.com |

Coordinateurs départementaux, urbains et contacts

| | | |
|--|---|--|
| Axel Rousseau <i>Île-de-France</i> | voir JEFO-estraro | |
| Thomas Genty <i>Bourg-en-Bresse</i> | 961, chemin de Corneloup - Valuisant le Bas 01250 Villereversure | tél. : +33 4 74 30 60 89 / pierregenty@planetis.com |
| Cyrille Pouillet <i>Hauts-de-Seine</i> | voir JEFO-estraro | |
| Céline Bernard <i>Orange</i> | 4, rue Saint-Florent 84100 Orange | tél. : +33 6 30 97 23 88 ou +33 4 90 60 64 10 celine.bernard@esperanto-jeunes.org |
| Emmanuel Villalta <i>Paris (contact)</i> | 4, rue Florence Blumenthal 75016 Paris | tél. : +33 1 45 27 42 35 ou 08 70 06 26 86 manu@esperanto-jeunes.org |
| Laurent Vignaud <i>Pays de la Loire (contact)</i> | 3, allée du Haras (app. 132) 49100 Angers | tél. : +33 2 41 20 19 40 / laurent.vignaud@free.fr |
| Rose Sanz <i>Val-de-Marne</i> | 63, rue André Tessier 94120 Fontenay-sous-Bois | tél. : +33 1 48 73 57 72 / Rsanz@esperanto.org |

Autres coordinateurs

Cours Internet : Ingrid Malaquin (ingrid@esperanto-jeunes.org) et Emmanuelle Richard (emmanuelle@esperanto-jeunes.org)
 BEMI – Cycliste : Xavier Godivier xgodivier@esperanto.org / tél. : +33 2 99 22 99 07 ou 08 73 17 02 55 (tarification locale)
 Recettes des weeks-ends gourmands : Rozenn & Clément Picard : rpicard@esperanto.org / tél. : +33 2 23 50 13 35

